

Bulgara

ESPERANTISTO





Sukcese finiĝis E-kurso por komencantoj en Trojan. Kursgvidinto Ivan Lišov.



E-kurso por komencantoj en Pleven. Kursgvidinto Simeon Hesapčiev (vd. paĝon 8)

ENHAVO

* * *	Deklaro de CE de BEA kaj MEM.	1
	Prof. d-ro Stojan Ĝuĝev. Pri la 90-jara	
	zĝo de Esperanto	2
	Asen Grigorov. La Naŭa de Septembro .	5
	L. U. Belous. Tiu ĉi renovigita lando! .	5
	Ĥrima. Simbolo de firmeco kaj fideleco .	6
	Pepa Ivanova. Esperanto kaj la ekonomia	
	ekologio	8
	Venecij Georgiev. Estontaj E-instruistoj	8
* * *	Laŭdinde!	9
	Canko Murgin. Ĥristo Ĥaralambev — la	
	unua prezidanto de BEA.	9
* * *	63-a UK de Esperanto	10
* * *	Deklaro de MEM	13
* * *	Koncize	14
	Kunĉo Válev. „En la vicoj de la klaso“	15
	Violin Oljanov. Ĉu teknikumo? Ĉu kom-	
	bi numo?	16
* * *	Sona gazeto	16
	Ljudmila Jevsejeva. Plumzigzagoj. . . .	III
	Kuraĝulino	III
* * *	Tra la gazetaro	III

Sur la kovrilpaĝo :

La partoprenintoj en la Internaciaj Kursoj por Esperanto-Instruistoj en Burgas (1—20 de aŭgusto 1977): 205 ges-anoj (poloj, hungaroj, slovakoj, ĉeĥoj, germanoj, rumanoj, bulgaroj)

Redakta Komitato :

Kunĉo VÁLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEK-SIEVA, Marin BACEV, Luba BOJAĜIEVA, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Dimitro DENĈEV, Dimitro HAĜIEV, Krâst'u. KARUCIN, Haim LEVI, Vaŝ'a PETROVA.

Korektis : Rajna Konstantinova

DEKLARO

La bulgaraj esperantistoj, kiuj uzas la internacian lingvon Esperanto por interkompreniĝo, amikeco kaj paco inter la homoj en la tuta mondo, esprimas sian profundan indignon kaj koleron kontraŭ la decido de la nova administracio de Usono komenci produktadon de neŭtrona bombo kaj flugantaj raketoj. La homaro bone memoras Hiroŝimon kaj havas klaran imagon pri la teruraj konsekvencoj, kiujn havos tiu ĉi barbara decido, direktita kontraŭ la tutmonda paco, la homaro kaj la prudento.

La intenco de Pentagono loki tiun ĉi armilon en Okcidenta Eŭropo estas paŝo malantaŭen, al la malvarma milito, kaj kaŝas en si realan danĝeron pri nuklea milito ne nur en la malnova kontinento, sed ankaŭ en la tuta mondo.

La prezidanto de Usono, kiu surmetas maskon de «defendanto» de la homaj rajtoj, aprobis la produktadon de neŭtrona bombo — tiu ĉi monstra armilo por trankvila ekstermo de milionoj da homoj. Per tio li montris sin antaŭ la tuta homaro kaj antaŭ sia propra popolo kiel ŝtatestro, kiu rompas la plej gravan homan rajton — la rajton vivi.

Dank' al la senlacaj klopodoj de la pacfortoj kaj la subteno de la sobre pensantaj ŝtatestroj la mondo ĝuas la malstreĉecon en la internaciaj rilatoj kiel ĝustan vojon al konservo de la plej granda homa bono — la paco. Nun la esperoj de la popoloj estas direktitaj al la antaŭstaranta renkontiĝo en Beogrado, kiu devas daŭrigi la aferon de Helsinko. Per la produktado de neŭtrona bombo kaj flugantaj raketoj Usono fakte torpedas la decidojn en Helsinko kun la malkaŝita deziro trudi siajn rabajn ambiciojn per konkurado en la armiĝado.

La bulgaraj esperantistoj insistas, ke la prezidanto de Usono Carter ĉesigu la produktadon de neŭtrona bombo kaj flugantaj raketoj, por ke povu sukcese daŭri plu la intertraktoj pri ĉesigo de la konkurado en armiĝo kaj pri malpermeso de ĉia ajn nova armilo por amasa neniigo de homoj.

Kategorian «Ne!» al la neŭtrona bombo kaj la flugantaj raketoj!

Firman «Jes!» al la malarmiĝo kaj la paco en la tuta mondo!

PRI LA 90-JARA AĜO DE ESPERANTO

Okaze de la naŭdeka datreveno de la kreo de Esperanto estas konvene fari bilancon de tiu ĉi preskaŭ jarcenta periodo de ekzistado de la internacia lingvo, konstati ĝiajn atingojn, prijuĝi ĝiajn malsukcesojn. Tia bilanco estas des pli aktuala, ĉar lastatempe aperis kelkaj pesimismaj pritaksoj, venantaj el la medioj de meritaj pioniroj, pri la nuna stato kaj pri la perspektivoj de nia movado kaj de nia lingvo. Preskaŭ ĉiuj ĉi pritaksoj reduktiĝas al la konstato, ke naŭdek jarojn post sia naskiĝo Esperanto troviĝas ankoraŭ tre malproksime de sia definitiva venko.

Evidente iuj alkutimiĝis, konforme al la principo de analogio, juĝi pri la aĝo de la lingvoj laŭ la periodoj de la homa vivo. Vere, por la vivo de la homo la aĝo de naŭdek jaroj estas aĝo tre respektinda kaj ankaŭ tre malofta, kiu jam indikas la epilokon de lia surtera ekzistado. Malmultaj feliĉuloj atingas ĝin. Tamen la aĝoj de la lingvoj kaj de la kulturoj ne koincidas kun la sezonoj kaj duonsezonoj de la homa vivo. En la vivo de la lingvoj naŭdek jaroj estas aĝo de ilia plej frua infaneco. Sed la ĝenerala publiko, ne konsiderante la leĝojn de la lingvo-historio kaj evoluo, juĝas pri la nuna stato de Esperanto laŭ la nuna stato de la grandaj naciaj kulturlingvoj de nia epoko, kiuj troviĝas en la apogeo (iuj eĉ en la kaduka aĝo) de sia ekzistado.

Nu, la lingvojn — tute egale ĉu etnajn aŭ „artefaritajn“ — oni devas esplori kaj ĝenerale konsideri ne nur sinkrone, en unu sola momento de ilia ekzistado, kiel momentan fotografaĵon aŭeron el la filmbendo de ilia evoluo, sed ankaŭ diakrone, t. e. en pluraj etapoj kaj eĉ tra la tuta skalo de ilia historia estiĝado. Tiam oni konstatos, ke, ekzemple, kompare al la preskaŭ kvarmiljara historio de la greka lingvo, la periodo de naŭ

jardekoj egalas kvazaŭ tiun de unu palpebrumol

Do la kompara metodo ne ĉiam estas taŭga por lingvistikaj esploroj kaj eĉ povas erarigi la esploriston, se ĝi estas aplikata *mekanike*, hazarde kaj senpripense. Ekzemple la komparo inter la komenca stato de evoluo de iu lingvo kun la malfrua aŭ fina stato de alia lingvo — malgraŭ la samtempeco de tiuj statoj — estas arbitra kaj malĝusta, malkorekta. Tiel, komparante mekanike malsamajn etapojn (ciklojn) de evoluo, ekzistantajn en sama historia momento inter lingvoj kun granda diferenco de aĝo kiel Esperanto kaj la angla, iuj interlingvistoj el la naturalisma skolo venis al la absurda konkludo, ke Esperanto estas tre primitiva idiomio, ĉar ĝia grado de evoluo, t. e. kategorio de perfekteco, estas tro malproksima de tiu de la grandaj modernaj etnaj lingvoj. Kiam la skeptikuloj emfazas pri la leksika riĉeco kaj la precizeco de la franca, pri la belsoneco de la rusa, pri la literatura trezoro de la germana, pri la kreskado kaj eksterordinara disvastiĝo de la angla kompare al Esperanto, ili ordinare forgesas la diferencon de aĝo. . .

Kalkulante tiun ĉi diferencon, la bilanco por la naŭdekjara periodo tute ne estas favora al la naciaj lingvoj!

Ekzemple por la franca lingvo tiu ĉi periodo de plej frua infaneco kondukas nin al la epoko de la reĝo Charles le Chauve (Karlo la Kalvulo) en la IX jc., kiam estis verkita la unua kaj la sola skriba dokumento en tiu ĉi lingvo — „La juro de Strasburgo“ (842 j.) Cent jarojn poste estis skribita en franca lingvo la unua „libro“: „Vie de saint Léger“ (X. jc.) — kompreneble, ĉiam en manuskripto, ĉar Eŭropo ankoraŭ ne konis la presarton. Nu, en la koresponda periodo de sia ekzistado, eĉ en sia pli juna aĝo, Esperanto havas jam multajn milojn da presitaj libroj. Apenaŭ du jar-



centojn post la formiĝo de la franca lingvo (1040 j.) aperis la dua (ankaŭ manuskripta) verko en tiu ĉi lingvo: „Vie de saint Alexis“. Ankaŭ „La chanson de Roland“ (La kanto pri Rolando), la fama epopeo, kiu inaŭguras la francan poezion, formiĝis apenaŭ kiam la franca lingvo atingis la aĝon de tri jarcentoj. (Mi arbitre akceptas la tezon, ke la historio de la lingvo, kiel tiu de la nacio, komenciĝas per la apero de la unua skriba dokumento, sed ofte la antaŭalfabeta periodo de la lingvo povas daŭri kelkajn jarcentojn, eĉ jarmilon). Do por krei siajn ĉefverkojn, Adam de la Halle devis atendi kvar jarcentojn, Villehardouin — ankaŭ, François Villon — ses, Ronsard kaj Rabelais — sep, La Fontaine, Boileau, Corneille, Racine kaj Molière — ok, Voltaire, Rousseau kaj Chateaubriand — naŭ, kaj, por fekundigi sian lingvon, Balzac, Hugo, Lamartine, Flaubert, Daudet kaj Maupassant devis atendi dum unu jarmilo! Jam en la dudeka jarcento — mil cent jarojn post la „Juro de Strasburgo“, kiu atestas pri la naskiĝo de la franca lingvo, la genioj de Henri de Régner, Paul Valéry, Emile Verhaeren, Paul Claudel, Maurice Maeterlinck kaj de multaj aliaj ankoraŭ laboras por la pluperfektigo de tiu ĉi lingvo). Mi faras la komparon kun la franca lingvo, ĉar ĝi havas la plej gloran literaturan historion. Do estas evidente, ke dum la unuaj naŭdek jaroj de sia ekzistado Esperanto kreis literaturon multoble pli riĉan ol la literaturo, kiun produktis la franca lingvo dum siaj unuaj kvar aŭ kvin jarcentoj.

En sia naŭdekjara aĝo la aliaj grandaj naciaj lingvoj montris ankoraŭ pli modestan literaturan kaj poezian kreadon. Ekz. la originon de la angla lingvo oni ordinare situigas en la V jc., kiam, post la retiriĝo de la romiaj okupantoj, la ĝermanaj piratoj (ĉefe vikingoj el Danlando) invadis orientan Britujon kaj plantis tie sian lokan idiomon. Tiu ĉi idio-

mo, kiu post dekkvin jarcentoj da evoluo fariĝis la plej disvastigita lingvo en la mondo, ĝis la VIII jc., t. e. ĝis sia tricentjara aĝo, havis nenian literaturan verkon! Ĝi ankaŭ devis atendi okcent jarojn ĝis la naskiĝo de Shakespeare kaj de Ben Johnson, sescent jarojn ĝis la apero de Chaucer (1340—1400) kaj preskaŭ mil jarojn ĝis la kreo de la verkoj de Walter Scott, Byron, Shelley, Keats, Longfellow kaj Edgar Poe. . .

La originon de la rusa literatura lingvo oni ordinare koincidigas kun la akto de kristanigo de la rusa popolo (fino de la X jc.). Tamen ĝis sia aĝo de naŭdek jaroj tiu ĉi lingvo posedis nenian originalan skriban dokumenton krom la kirilalfabeta subskribo de reĝino Anna Jaroslavna (filino de Jaroslavo la Saĝa) sub la teksto de oficiala dokumento de 1063 j. La fama Kroniko de Nestor estas skribita jam en la XII jc. kaj „Zadonščina“ — en la XIV—XV jc. La verkoj de Lomonosov aperas ok jarcentojn post la formiĝo de la rusa literatura lingvo, kaj de Puŝkin — preskaŭ naŭ jarcentojn.

La stato de la germana literatura lingvo por la sama aĝo estas preskaŭ la sama: naŭdek jarojn post la formiĝo de tiu ĉi lingvo, inaŭgurita per la unua skriba dokumento (la manuskripto de Otfrid, ĉ. 750 j.) pulsas nenia literatura vivo. La poemo de la Nibelungoj, la verkoj de Martin Opitz, la poemoj de Klopstock aperas jam kelkajn jarcentojn pli malfrue, kaj la verkoj de Herder, la dramoj kaj la poemoj de Schiller kaj de Goethe — preskaŭ mil jarojn post Otfrid.

Ĉu ne estas do admirinde, ke nur dum la unuaj naŭdek jaroj de sia ekzistado, t. e. dum sia aĝo de suĉinfano, dum kiu la t. n. grandaj kultur-lingvoj havis nenian aŭ preskaŭ nenian literaturan kaj poezian vivon, Esperanto jam sukcesis florigi literaturon, kiun povus envii kaj jaluzi multaj nuntempaj etnaj lingvoj? Kiu alia lingvo en tiom mallonga

periodo sukcesis produkti tiom da talentaj poetoj en ĉiuj partoj de la mondo? Tiom da skoloj, tiom da nomoj, tiom da stiloj, tiom da ĝenroj, tiom da titoloj! Dum naŭ jardekoj la Internacia Lingvo sukcesis kulturi poezion, eduki poetojn el la kategorio de Zamenhof, A. Grabowski, N. Hohlov, K. Kalocsay, H. Dresen, L. Tàrkony, R. Schwartz, J. Baghy, W. Auld, M. Boulton, B. Ragnarsson ktp. ktp.; ĝi naskis oratorojn el la rango de Edm. Privat, Im. Olsvanger, I. Lapenna k. a.; aktorojn kiel I. V. Šamla, T. Berdiček, A. Novotna, Tomecki, Belka Beleva, Anani Anev, Petro Vasilev, Srdjan Flego, Mira Ĵupan, M. Šerment, Eta Bertolaci, Jana Ravšelj, Liljana Genez, T. Rogulja ktp.; kantistojn kiel Ramona van Dalsem, Veselin Damjanov, Rene Jordanova, Maria Angelova k. a. Dum malpli ol unu jarcento Esperanto florigis literaturajn skolojn en diversaj punktoj de la terglobo, nome: la Slava Skolo (de la unua generacio — I. Lojko, V. N. Devjatnin, Leo Belmont, A. Kofman, Felikso Zamenhof k. a.), la Norda Skolo (V. Langlet, K. Svanbom, K. M. Nordensvan, O. Zeidlitz, Paul Nylén k. a.), la Franca Skolo (Célestin Rousseau, Henri Sentis, Karlo Bourlet, Emile Boirac, Henri Vallienne, Théophile Cart, G. Waringhien k. a.), la Budapeŝta Skolo (Lajos Tàrkony, I. Baranyai, F. Szilágyi k. a.), la Estona Skolo (Hilda kaj Helmi Dresen, Hendrik Adamson), la Latva Skolo (Nik. Kurzens, Ludmila Jevsejeva, August Kazoks), la Germana Skolo (Karl Vanselow, Oscar Bunemann, Teo Jung k. a.), la Belga Skolo (Maur. Jaumotte, Janne van Bockel, Van der Biest k. a.), la Ĝeĥoslovaka Skolo (O. Ginz, Stan. Kamaryt, R. Hromada, T. Pumpr, M. Lukaš, J. Kořínek k. a.), la Svisa Skolo (Arthur Baur, H. Blaser), la Sveda Skolo (Magda Carlsson, Stellan Engholm, G. Johansson, Varma Thilander), la Japana Skolo (Ossaka Kenji, Na-

kamura Tazuo, U. Masao k. a.), la Bulgara Skolo (ADA, A. Grigorov, S. M. Simeonov, D. Zlatarski, St. Kiragiev, N. Nedelčeva, Pr. Prodanov k. a.). La deko da antologioj de naciaj belestroj estas unikaĵo en la tutmonda literaturo, ĉar ĉiuj ĉefverkoj, presitaj en ili, estas kompetente tradukitaj de samnacionoj kaj samlingvanoj de la aŭtoroj. Neniu alia lingvo — nacia aŭ internacia — prezentas tian riĉan trezoron de skoloj, stiloj kaj nuancoj.

Tiu ĉi lavanga kreskado de la E-literaturo kaj poezio en tiom mallonga periodo, tiu ĉi ŝtorma disvolviĝo de unu originala internacia kulturo sur la bazo de Esperanto estas pruvo pri la senlimaj potencialaj fortoj, pri la neelĉerpeblaj eblecoj de nia mondlingvo.

Iuj eble povus kontraŭargumenti jene: prave, Esperanto multe pli rapide ol la naciaj lingvoj (ol ĉiuj lingvoj!) kreis kaj evoluigis sian propran literaturon, sian altkvalitan poezion kaj sian originalan kulturon. Sed en la epoko, kiam kreiĝis la eŭropaj lingvoj kaj kulturoj, la ĝenerala stato de la homa civilizo havis tre malaltan nivelon. Pro tio la naciaj literaturoj tiom maltrapide kreskis. Tia opono ne estas prava, precipe en tio, kio koncernas la literaturon. La modeloj de „Iliado“, de „Odiseo“, de „Eneido“, de „Vedoj“ kaj „Upaniŝadoj“ jam delonge ekzistis! La scienca kaj la teknika progreso en la historio sekvas la literaturan floradon kaj ne antaŭiras, t. e. ne determinas ĝin.

Kiam oni juĝas pri grado de progreso, evoluo kaj kreskado de diversaj lingvoj, oni do devas rigardi la grandajn kaj maljunajn vivantajn lingvojn en retrospektivo, dum la junan planlingvon Esperanto oni devas konsideri en perspektivo. Iuj malnovaj grandaj lingvoj kiel ekzemple la greka, kune kun sia apogo kaj glora pasinteco, portas en si la ĝermon de maljuniĝo (neniu lingvo estas eterna),



dum la ĵus naskiĝinta internacia planlingvo kaŝas en si mem la forton kaj la eblecojn de la burĝono. Aŭ, por uzi la trafan kaj tre konvenan esprimon de Penĉo Slavejkov:

Post ili nokt' malhelas,
Tag' antaŭ ĝi leviĝas!

La defetismo en la sfero de la lingvo estas pli danĝera ol la defetismo sur la batalkampo. En la batalo por mondlingvo, kiel en la batalo por nacia lingvo kaj por nacia sendependeco, ne estas loko por dubo, hezito, cerbumado kaj pesimismo. Kiel prave notas Alphonse de Chateaubriand, la argumentoj de la koro foje estas pli fortaj kaj pli konvinkaj ol la argumentoj de la cerbo. La lingvo estas antaŭ ĉio socia fenomeno, kaj la sociaj konsideroj en tiaj cirkonstancoj estas

ne malpli gravaj ol la mallarĝe lingvistikaj. Ekzemple, se tiaj pure lingvistikaj konsideroj, duboj kaj hezitoj estus okupintaj la menson de la Hilendara Monako Paisij en la mezo de la XVII jc., kiam la bulgara lingvo estis sur la vojo de malapero; se li estus cedinta antaŭ la tre allogaj tezoj de la fanariotoj pri la malplivaloro de nia nacia idioma kompare al la glora, riĉa, perfekta, dum pluraj jarmiloj elprovida greka „superlingvo“, — hodiaŭ nek bulgara lingvo, nek bulgara nacio, nek bulgara ŝtato estus ekzistantaj. . . Simila estas hodiaŭ la stato de la internacia lingvo Esperanto kompare al la stato de la grandaj nuntempaj naciaj superlingvoj. Tiu ĉi stato tamen ne devas vekti en la armeo de la batalantoj por mondlingvo komplekson de malplivaloro kaj defetismo!

33-jariĝo de nia libero

As. Grigorov

LA NAŬA DE SEPTEMBRO

Malfermu larĝe la fenestron
por la septembra suno.
Rigardu tiun stratan feston
de gajo kaj de juno!

Sur la balkonon metu florojn
purpurajn, bluajn, flavajn.
Malfermu, homoj, viajn korojn
en tiuj tagoj ravaj!

Realas jam la revo tera,
la vortoj de l'poemo:
septembro iĝis majo vera
la tero mem — edeno!

Malfermu larĝe la fenestron
por freŝo kaj aero,
kaj bonvenigu nian feston —
la tagon de l'libero!

TIU ĈI RENOVIGITA LANDO!

Je la 7 de septembro 1944 mi ricevis ordonon de la frontkomandanto marsalo Tolbuhin: „Transiri impete la bulgaran ŝtatlimon, disbati la malamikon, likvidi la faŝistajn konkerintojn en Bulgario kaj liberigi la fratan bulgaran popolon.“

La 8-an de septembro sen artileria preparo kaj sen bombado el la aero komenciĝis la operacio por liberigo de Bulgario. Eĉ ne kun unu pafo el ambaŭ flankoj la Ruĝa Armeo enpaŝis la bulgaran landon. Ĉie, kie ni trapasis, la homoj renkontis nin kun floroj kaj vinberoj, kun pano kaj salo*, renkontis nin sloganoj „Bonan venon!“

Marŝante tra la lando, ni vidis la suferintan, sed ne subigitan, heroan bulgaran popolon.

Ni vidis, kiel via popolo konservis la rememoron pri Šipka, Sejnovoj kaj Plevno, kie la rusaj soldatoj kaj la bulgaraj volontuloj montris senprecedencan heroismon**. Nun en tiu ĉi lando mi vidas la nevelkantan dankemon al la sovetaj armeanoj. Kaj ni, la rusaj homoj, dankas pro tio.

Kiel civitano de Sovetunio mi fieras, ke mi estas honorita per bulgaraj distingoj kaj mi estas honora civitano de Stara Zagora. En mia laboro aperadis neceso ofte viziti Bulgarijon. Ĉiam mi revenis en mian patrujon kun bonegaj impresoj pri via lando, pri la varma kaj sincera akcepto, kiun mi trovis ĉie, kie mi estis. Tiu varma, sincera, frata amikeco vivu eterne!

Moskvo

Leonid Ustinoviĉ Belous

* Laŭ malnova popola kutimo en Bulgario.

** Dum la Rusa-Turka Liberiga Milito (1877—1878).

SIMBOLO DE FIRMECO KAJ FIDELECC

En la jaroj de mia juneco mi estis feliĉa kontaktigadi kun kamaradoj, al kiuj mi ŝuldas mian konverton al Esperanto kaj la komunisma ideologio. Mi volas rakonti pri du el ili.

Vasil Mindev

Se li ankoraŭ vivus, nun li estus 75-jara.

Li naskiĝis en la suda parto de Rodopi-montaro, en vilaĝo Enikjoj. Post la Unua Mondmilito Vasil rifuĝis al Asenovgrad. Jam kiel knabo li fariĝis tabaklaboristo. Li baldaŭ adaptiĝis al la laborista medio kaj partoprenis la klasbatalojn fariĝinte aktiva membro de la Sindikato de Tabaklaboristoj.

En la Popola Domo de Aseonovgrad lektoroj parolis ofte pri diversaj temoj. Foje li aŭskultis propagandiston, kiu rekomendis al la laboristoj lerni la internacian lingvon Esperanto. Vasil tuj aliĝis al la kurso kaj diligente studis la lingvon. Post la kurso li aliĝis al la loka E-societo kaj ĉiudimanĉe vizitis la kunvenojn. La prezidanto de la societo estis sperta esperantisto kaj helpis la novulojn perfektigi. Li petis la ĉeestantojn, ke ĉiu legu ekzercojn el „Fundamenta krestomatia“, artikolojn el „Heroldo de Esperanto“, „Verda stelo“ kaj „La praktiko“.

En 1929 j. Vasil partoprenis la preparlaborojn por fando de laborista grupo ĉe la loka E-societo. En decembro de la sama jaro li subite malaperis. Famo kuris, ke li estas arestita kiel gvidanto de revolucia organizo.

Pasis kelkaj jaroj kaj Vasil revenis hejmen. Lia alta staturo estis mal-

grasiĝinta, lia vizaĝo aspektis vak-sopala. Dum sia libera tempo li evitis promenadi tra la polvaj stratoj kaj proponis al mi akompani lin en la pinarbaron. Li ĉiam kunportis librojn kaj broŝurojn. Foje, kiam ni ripozis sur alta roko, li montris al mi verkon de Haeckel (Hekel) — „La mondenigmoj“ — kaj aldonis:

— Mi rekomendas tralegi ĝin atente, ĝi helpas al vi penetri en la sekretojn de la mondo. Vi ekscios pri la evolu-teorio de Darwin...

Alifoj li kunportis sciencajn revuojn, marksismajn librojn. Iutage mi aludis:

— Vi eliris el la malliberejo kun filozofa klereco...

Li ridetis amare kaj respondis:

— Mi ne bedaŭras la tempon en la prizono. Tie mi trovis kamaradojn, kiuj posedis riĉajn sciojn kaj faris multon por mia kleriĝo.

— Oni diras, ke la policianoj submetis vin al teruraj torturoj...

— La veron oni diras. En la polica kazemato iu esploristo, kiu sin prezentis kiel ŝuisto, enajlis alumetojn sub miajn ungojn. Alia vipis kruele miajn plandojn. Paro da inkvizitoroj bobenis mian bruston per metalfadeno kaj apenaŭ ne ekzekutis min per elektra kurento. La samaj esploristoj ligis miajn manojn sur la dorso kaj levis min ĝis la plafono... Miaj okuloj nebuliĝis kaj mi perdis konscion. La lasta torturo estis batado surbrusten per sablosaketoj, pro kio mi malsaniĝis je ftizo... — Vasil enspiris gudroaromon de la pinarboj kaj konkludis: — Jen kia estas la faŝista polico. Sen koni ian ajn fakton, nur pro denunco oni torturis min tutan mona-

ton kaj detruis mian saĝon. Tamen spite al la bestaĉoj mi ne konsentis fari konfeson pri tio, kion ili postulis de mi, mi ne perfidis mian klason.

La kuracado de la ftizo postulis abundan kaj bonkvalitan nutraĵon, kian la senlabora tabaklaboristo ne povis liveri al si. Lia sano rapide malboniĝis. Li forveturis kuraci sin en diversaj sanatorioj, sed neniun kuracejo helpis al li. Iun tagon mi vizitis lin en hospitalo de Plovdiv. Vasil loĝis en unu ĉambro kun la antifaŝista poeto Nikolaj Ĥrelkov. Mi provis kuraĝigi ilin dirante, ke ili havas rozkolorajn vangojn. La poeto ironie rimarkis, ke ankaŭ iuj pomoj estas ruĝaj, sed vermoboritaj.

Vasil aldonis:

— Ni decidis forpasi, post kiam oni venĝos al niaj klasaj malamikoj!

Kaj vere okazis tiel, kiel diris li: ili ambaŭ forpasis post la venko super la faŝismo.

Ivan Armin

Ni estis samvilaĝanoj. Ivan estis pli aĝa ol mi, kaj mi memoras lin kiel amuzan rakontiston. Tage ni laboris en la tabakdeponejoj en Ksanti, vespere sub centjara platano li rakontis al ni, vilaĝaj knaboj, legendojn pri Krali Marko kaj anekdotojn pri Ruza Petro kaj Nasreddin Hoĝo.

Post la Unua Mondmilito lia familio rifuĝis en Plovdiv, la mia — en Asenovgrad. Ni vidis unu la alian post ok jaroj, ĉe la kongreso de BEA en Plovdiv, 1927 j. En la sama jaro Asenovgrad fariĝis facile alirebla, ĉar ekfunkciis la nova fervojo. Nun Armin pli ofte ekskursis al la pitoreska ĉirkaŭaĵo de Asenovgrad. Ofte li alportis al mi proletajn E-gazetojn, el kiuj ni, laboristoj-esperantistoj en Asenovgrad, informiĝis pri la ekzisto de laboristaj E-asocioj en multaj eŭropaj landoj. Armin agitis nin por la internacia laborista E-movado kaj sub lia instigo ni fondis laboristan E-grupon, kiu poste partoprenis la fondon de Bulgara Laborista E-Aso-

cio (BuLEA).

Dank' alli ni liveris al ni la librojn „Komunista manifesto“, „Ŝtato kaj revolucio“ de Lenin, „Eklumo en la abismo“ de H. Barbusse, „Ruĝa stelo“ de Bogdanov, „Kandid“ de Voltaire k.a. Nia E-biblioteko pruntedonis librojn al tiuj esperantistoj el la regiono, kiuj interesiĝis pri progresema literaturo.

La polico arestis Ivan Armin samtempe kun Vasil Mindev. Por pravigi la torturojn, uzatajn kontraŭ la antifaŝistoj, ĝi, kiel ordinaro, donis sensacian karakteron al la arestoj de Armin kaj liaj kamaradoj. La flava gazeto „Borba“ distrumpetis: „Malkovrita konspiro. Oni trovis grandan kvanton da komunista literaturo, sendita el Moskvo.“

Post 30 koŝmaraj noktoj en la polica kazemato, la vojo de Armin kondukis lin al la distrikta malliberejo. Tie oni traktis lin kaj liajn kamaradojn kiel danĝerajn krimulojn.

— Oni katenis kaj ŝlosis min en cementa karcero, kies fenestro estis sen vitro. Pro la januara frosto mi malsaniĝis de akuta reŭmatismo, — diris li al sia pli juna frato, kiam tiu vizitis lin en la prizono.

Post tri jaroj Armin eliris el la malliberejo serioze malsana. Tiu-tempe en nia lando mankis kondiĉoj por kuracado kaj la Internacia Helporganizo (MOPR) proponis al li veturi al Sovetunio por kuraci sin. Pasporton Armin ricevis nur post du jaroj kaj forveturis al Istanbul. Ankaŭ tie li devis atendi kelkajn semajnojn la sovetan vizon. Estante senmona, li vivtenis sin disportante trinkakvon aŭ vendante siajn havaĵojn — valizon, lanveston, jakon, kasikedon. . .

La reŭmatologoj en Sovetunio estis senpovaj kontraŭ la insida malsano. La piedoj de Ivan ĉesis obei, kaj fine la malsano alnajlis lin al la lito. Tamen lia koro pulsas. Ivan ne volis esti vivanta kadavro. En la hospi-

talo oriente de Moskvo li trikis ŝalojn kaj gantojn por la ruĝarmeanoj.

Post la fino de la milito mi trovis lian adreson kaj sendis al li diversajn E-gazetojn. La 27-an de marto 1957 j. Ivan skribis al mi el urbeto Birljuki, regiono de Moskvo.

„Dankon pro la senditaj gazetoj kaj speciale pro „Nuntempa Bulgario“, kiu liveris al mi grandan ĝojon. Dum dudek jaroj mi estas fiksitita al la lito kaj ne okupiĝas pri Esperanto. Tamen mi ne forgesis la lingvon kaj libere legas, sen vortaro. . . Ĉi tie nun regas vintro kaj mi revas pri nia printempo. . .“

Du jarojn post tio li revenis Bulgaron. La Ruĝa Kruco loĝigis lin en la Domo de la Revoluciulo en urbeto Bankja apud Sofio. En lia ĉambreto ĉiam troviĝis Esperantaj, ruslingvaj kaj bulgarlingvaj gazetoj

ORGANIZA VIVO

ESPERANTO KAJ LA EKONOMIA EKOLOGI

Jam kvin jarojn en la Supera Financa Ekonomia Instituto en urbo Sviŝtov funkcias speciala fakultativa kurso pri ekonomia ekologio. Ĝia gvidanto estas prof. H. Marinov.

Dum sia lasta scienca vojaĝo en Pollando la gestudentoj mem konvinkiĝis, ke ilia gvidanto prof. Marinov per la internacia lingvo Esperanto rapide aranĝas multajn sciencajn kaj praktikajn problemojn.

Post sia reveno en Bulgaron prof. Marinov lektiis speciale pri la praktika uzado de Esperanto en la scienca agado kaj internaciaj rilatoj. Poste la gestudentoj diskutis la problemon pri Esperanto kaj la ekonomia ekologio. Ili decidis komenci studi Esperanton okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Varna en 1978.

Do, dum la monatoj majo kaj junio prof. Marinov kune kun la sciencaj lekciroj pri ekonomia ekologio donis al la studentoj kelkajn lecionojn pri la alfabeto de Esperanto kaj ĝia gramatiko. Ĉirkaŭ 50 gestudentoj ekstudis ĉiusemajne Esperanton. Ili havas la ideon ne nur ĉeesti la kongreson en Varna, sed ankaŭ organizi specialan sekcion pri ekonomia ekologio.

Pepa Ivanova

kaj revuoj. Lin distris ĉiutage la radio. Ivan ege bedaŭris pro la nepovo moviĝi kaj veturi al Plovdiv, por vidi kiel aliformiĝis la urbo, kie forpasis lia juneco kaj kie dum tri jaroj li estis gvidanto de Komsomolo (la junkomunista unuiĝo). Gastante ĉe li mi ofte aŭdis lin ripeti la proverbon „Ne kredu al orelo, kredu al okulo“, post kio li aldonadis:

— Mi kredas al niaj radio kaj gazetaro, sed estas preferinde direkti la proprajn okulojn al la novaj domoj kaj uzinoj, al la vastaj legomĝardenoj kaj vitkampoj. . . Ho ve, mi neniam tion povos!

Armin forpasis en marto 1963, en sia 60-jara aĝo.

Ambaŭ miaj amikoj — Vasil Mindev kaj Ivan Armin — estis por mi veraj simboloj de proleta firmeco kaj fideleco al siaj idealoj.

[ESTONTAJ E-INSTRUISTOJ

Dum la lastaj jaroj la Distrikta Estraro kaj la urba E-Societo „Eterna Amikeco“ en Pleven dediĉis multajn fortojn por organizi kursojn por instruistoj. Antaŭ ĉio la DE plibonigis sian laboron kun la distrikta fako „Popola Klerigo“ — kune kun ĝi estis dissendita letero al ĉiuj lernejoj en la distrikto. La anoj de la DE Pantelej Gospodinov, Liŝko Liŝkov kaj la instruisto Doĉev vizitis diversajn lernejojn kaj parolis kun instruistoj, gvidantoj. En la distrikta gazeto „Septemvrijska Pobeda“ estis publikigitaj materialoj pri estontaj kursoj por instruistoj.

DE organizis distriktan konferencon, kie oni pridiskutis tiun ĉi problemon. Por instruisto ni invitis Simeon Hesapĉiev el Sofio.

En la pasinta jaro ni organizis 2 kursojn kun 66 instruistoj. Ĉi-jare ankaŭ sukcese finiĝis 2 kursoj kun 26 instruistoj. Ĉiuj ricevis diplomon por la I. grado. La kursoj okazis en la somera ferio.

Ĝis la fino de 1977 j. ni organizos ekzamen session por ĉiuj geinstruistoj, kiuj ĝis nun lernis Esperanton. Nia celo estas: disvastigi Esperanton inter tiuj, kiuj jam lernis fremdan lingvon; plibonigi nian laboron inter la geinstruistoj-esperantistoj kaj prepari kondiĉojn venontjare sendi al la superaj gradoj de la kursoj en Burgas (Menden Rudnik) multe da instruistoj.

Venecij Georgiev



La ciferoj en krampoj montras la membrojn por 1976 j. La ordo — alfabeto laŭ distriktoj.

Varna, s-to «Fajrero» ĉe la Distrikta Popola Soveto — 125(123)

v. Goren Ĉiflik, distrikto de Varna, s-to «Jeĉka Karamfilova» — 31(28)

Pazarĝik, s-to «Radio» — 105 (98)

Panagjuriŝte, s-to «Nova Stelo» — 14(11)

v. Momina Klisura, distrikto de Pazarĝik, s-to «Leono» — 19(12)

Sofio, uzina s-to «48-a Universala Kongreso» — 29(21)

Haskovo, s-to «Asen Zlatarov» — 70(48)

ĤRISTO ĤARALAMBEV — LA UNUA PREZIDANTO DE BEA

Ĥristo Ĥaralambev, la unua prezidanto de la Bulgara Esperantista Asocio, naskiĝis en urbo Veliko Tŕrnovo en 1881 j. Tie li ricevis sian klasikan gimnazian instrucon. Jam en la fino de la pasinta jarcento li estis varbita por Esperanto fare de la instruistino Anastasija Marinova Vâlĉeva. En 1900 j. lia nomo aperis en la Zamenhofa Adresaro sub n-ro 5118. En la sama jaro enviciĝis en la Adresaro ankoraŭ kelkaj esperantistoj de Veliko Tŕrnovo, inter kiuj Petro Jordanov, samkvartalano de Ĥaralambev. Jordanov poste fariĝis konata bulgara E-poeto, prezidanto de BEA kaj redaktoro de „Bulgara Esperantisto“. Ĥ. Ĥaralambev kaj P. Jordanov dum siaj renkontiĝoj parolis plej ofte en Esperanto. Tio helpis al ambaŭ gimnazianoj frue perfektigi en la lingvo. La apero de internacie agantaj esperantistoj en Veliko Tŕrnovo, precipe lernantoj kaj junuloj, pravas, ke la fondita en majo 1896 E-societo donis fruktojn.

La 4-an de januaro 1902 oni refondis la E-societon kaj donis al ĝi la nomon „Lumo“. Tiutempe „Lumo“ estis la dua laŭ signifo E-organizaĵo en la lando. La unua loko apartenis al la E-Klubo „Stelo“, fondita en urbo Plovdiv en februaro 1901. La agado de tiuj du lokaj societoj, unu en Suda kaj alia en Norda Bulgario, signas la konturojn de nova periodo en la evoluo de nia landa movado, periodo de fondo de landa organizaĵo.

Ĥristo Ĥaralambev okupis gvidpostenon en la refondita „Lumo“ — li fariĝis ĝia sekretario. En enketo de 1903 li konfesas, ke li kapablas paroli kaj skribi en Esperanto sen uzo de vortaroj. Ĥaralambev posedis ankaŭ rusan, francan, germanan, latinan kaj antikvan grekan lingvojn.

En 1903 j. li iĝis oficisto kaj komencis aktivan propagandon de Esperanto ne nur ĝenerale, sed ankaŭ konkrete — inter la laboristaro de sia urbo. La ĉefa temo de lia tiutempa eksterlanda korespondado estis la esperantistigo de la laboristoj. En la per-

soneco de tiuj li vidis la esencon de la socia strukturo.

La aserto, ke Ĥ. Ĥaralambev revenis el Rusio en Bulgario en la jaro 1900, estas malĝusta. Al Rusio li forveturis en la aŭtuno de 1903 estante jam sperta esperantisto. Tie li restis en urbo Jitomir (str. Vilskaja 33).

Post sia reveno Ĥaralambev donis grandan impulson al la esperantista movado — kaj en Veliko Tŕrnovo, kaj en la lando. Ekde la aŭtuno de 1906 li komencis eldoni la gazeton „Lumo“. Per tiu organo li fakte unuigis la tutan bulgaran esperantistaron. Ĥaralambev montriĝis talenta organizanto.

Kreinte la necesan grundon, Ĥaralambev en 1907 j. verkis la faman „Alvokon al la bulgaraj esperantistoj“, per kiu li invitis al okazigo de landa E-kongreso, kiu fondu landan E-organizaĵon kaj elektu presorganon de la organizita bulgara esperantistaro, ĉar tiutempe (1907) en Bulgario aperadis tri gazetoj: „Lumo“, „Bulgara Esperantisto“ kaj „Esperanto“.

Dekkelkaj lokaj E-grupoj kaj iuj unuopuloj sendis siajn rekomendojn kaj deklaris pretecon partopreni la unuan kongreson de la bulgaraj esperantistoj. Tio estis triumfo de la organiza strategio de Ĥaralambev.

Iom antaŭ la okazonta kongreso oni organizis en Sofio solenaĵon lige kun la 20-jara jubileo de Esperanto. Ĥristo Ĥaralambev partoprenis tiun kunvenon kaj li mem sendis saluttelegramon al d-ro Zamenhof je la nomo de la redakcio de gazeto „Lumo“. En la unua bulgara E-kongreso, kiu okazis la 5-an de aŭgusto 1907 li merite estis elektita kaj kiel prezidanto de la fondita Bulgara Esperantista Ligo, kaj kiel redaktoro de ĝia organo — la gazeto „Lumo“.

Post unu jaro la centro de la movado translokiĝis en Ŝumen kaj prezidanto de BEL fariĝis Ilija Silvestriev. Ĥaralambev restis redaktoro de „Lumo“, kiu daŭre aperadis en V. Tŕrnovo kiel organo de la ligo.

En 1910 j. laŭ decido de la IV kongreso de la bulgaraj esperantistoj „Lumo“ kunfan-

diĝis kun „Rumana Esperantisto“ kaj komencis aperadi komuna organo de la bulgaraj kaj rumanaĵ esperantistoj sub la nomo „Danubo“. Post kelka tempo „Lumo“ denove komencis aperadi kiel propaganda bulgaringva organo de E-societo „Lumo“ en V. Târnovo sub la zorgoj de H. Haralambev, P. Popov, Mladen Georgiev k. a.

En 1910 j. Haralambev iniciatis la fondon de biblioteko „Esperanto-mondo“, kies dua numero estis la fama „Ruĝa Broŝuro“ (bul-

gara traduko de franclingva propaganda mallonga gramatiko). Tiu broŝuro ludis gravan rolon por disvastigo de Esperanto en Bulgario.

H. Haralambev pereis sur la batalkampo de la Balkana Milito (inter Bulgario kaj Turkio) en 1912, estante apenaŭ 31-jara. Sed lia abnegacia kaj fruktodona laboro destinis al li por ĉiam certan lokon inter la plej elstaraj pioniroj de la bulgara E-movado.

Canko Murgin

TRA LA E★ MONDO

62-a UK DE ESPERANTO

Rejkjaviko, 30. VII—6. VIII. 1977

LA SOLENA INAŬGURO

En la kinejo de la universitata kvartalo de Rejkjaviko dimanĉe la 31-an de julio 1977 antaŭtagmeze kolektiĝis pli ol 1000 homoj el kvardeko da landoj — la partoprenantoj de la 62-a Universala Kongreso de Esperanto.

En la unua vico sidis s-ro Kristjan Eldjarn, la ŝtatprezidanto de Islando kaj alta protektanto de la kongreso. Kiel li, la tutan inaŭguron ĉeestis ankaŭ la ĝenerala direktoro de UNESKO s-ro Amadou Mahtar M' Bow. Sur la podio sidis ankaŭ la islanda kultur-ministro, s-ro Vilhjalmur Hjalmarsson, kaj la urbestro de Rejkjaviko, s-ro Birgir Isleifur Gunnarsson.

Je la 10 horo d-ro Humphrey Tonkin, la prezidanto de UEA, deklaris la kongreson malfermita. En siaj bonvenigaj vortoj li diris, ke la kongreso okazas en lando, kiu troviĝas „samtempe for de la kutimaj komunikaj vojoj kaj en la fluo de la moderna civilizo“. Post li s-ro Baldur Ragnarsson, la prezidanto de Islanda E-Asocio kaj de la Loka Kongresa Komitato, bonvenigis la kongresanojn; li menciis, ke la islandaj amaskomunikiloj montras grandan interesiĝon pri la kongreso. La Islanda Televido dissendos en Esperanto la diskuton pri la kongresa temo „La rajto je komunikado“.

Nome de la islanda registaro la kongresanojn bonvenigis la kulturministro Hjalmarsson, kiu parolis en Esperanto. Li esprimis sian simpatian al la strebado de la parolantoj de Esperanto krei liberajn kaj vivantajn kontaktojn inter homoj kaj nacioj tra la tuta mondo. La urbestro de Rejkjaviko en sia saluta mesaĝo, ankaŭ eldirita esperantlingve, atentigis, ke la eblecoj de komunikado internaciskala estas hodiaŭ pli grandaj ol iam en la historio de la homaro, sed ke plue la lingva baro malhelpas la plenan eluzon de tiuj eblecoj.

Poste la parolon prenis s-ro Ralph Harry, ambasadoro de Aŭstralio ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj membro de la Internacia Patrona Komitato de UEA, por enkonduka prelego pri la kongresa temo. Li diris interalie: „... ĉe perfekta libereco je komunikado ne estas garantio, ke neniam okazos konflikto. Okazis en la pasinteco kaj sendube denove okazos tragediaj dividoj inter popoloj, kiuj uzas saman lingvon. Sed la sperto indikas, ke diferencoj de lingvo pliiĝas la miskomprenon kaj malfaciligas la kunlaboradon. Kontraste, ni en ĉi tiu kongreso scias la kontribuon, kiun la komuna lingvo faras al la facileco de interkomunikado. Ne povus esti pli bona demonstro ol ĉi tiu grandioza internacia kunveno sen aŭskultiloj kaj sen interpretistoj.“

Ni, anoj de la Esperanto-movado, scias ankaŭ la detruajn rezultojn de la limigo de komunikado. Esperantistoj en multaj landoj estis malhelpataj per cenzuro, per oficiala malinstigo, per tuta malpermeso kaj per la bruligo de iliaj libroj. Multaj suferis malliberigon kaj torturon, eĉ la martiran morton. Kaj tamen Esperanto ne estis minaco. Ĝi estas „danĝera lingvo“ nur por diktatoroj, ŝovinistoj kaj reakciuloj.“

Post muzika intermeco parolis s-ro M' Bow, la ĝenerala direktoro de UNESKO. UEA havas konsultajn rilatojn kun UNESKO jam de la jaro 1954, sed estis la unua fojo, ke la plej alta reprezentanto de tiu organizaĵo partoprenas la inaŭguron de UK de Esperanto. S-ro M' Bow parolis franclingve; al la aŭskultantoj estis disponigita Esperanta traduko de lia parolado. Li diris, ke la taskoj de UNESKO estas „la plifortigo de la mondopaco, la kompreno inter la popoloj kaj la kunlaboro inter la nacioj“ kaj ke „Esperanto historie fontas el la sama principo“. Li donis koncizan superrigardon pri la klopodoj de UNESKO veni al difino de la koncepto „rajto je komunikado“. Al la



kongresanoj li atestis, ke ilia diskutemo estas „en la kerno de la nuntempa problemaro de la mondo“, ĉar „la komunikado inter popoloj kun diversaj lingvoj kaj kulturoj ĉiam ŝajnas esti idealo eminente dezirinda kaj atinginda“. Pensante pri la baroj de lingva diverseco kaj pri la rimedoj por venki tiujn barojn necesas konsideri, ke „ĉiuj lingvoj estas egalaj je digno kaj kiel iloj de komunikado, eĉ se ekzistas diferencoj pri la skalo de ilia disvastiĝo“. La kongresanojn motivas — finis s-ro M' Bow — samtempe la respekto al la kulturaj diversecoj kaj la deziro je internacia alproksimiĝo.

D-ro Tonkin transdonis al s-ro M' Bow kiel esprimon de danko ekzempleron de la luksa dulingva, itala kaj Esperanta, eldono de „Dia Komedio“ de Dante.

La Inaŭguron ĉeestis krome pluraj membroj de la Honora Komitato de la kongreso, diplomaciaj reprezentantoj, inter kiuj de Sovetunio, Britio, Francio, Usono, Ĉinio, Pollando, Hungario, ĈSSR ka.

Estis ricevitaj pluraj skribaj salutoj.

D-ro Tonkin fermis la solenan inaŭguron de la 62-a UK per la jenaj vortoj:

„Al ĉiuj niaj gastoj mi emfazas, ke la kongreso estas malferma al ili dum la tuta semajno. Ili sentu sin liberaj partopreni niajn kunsidojn kaj observi nian agadon. Mi kredas, ke ili konstatos, ke Esperanto ne estas ia eksperimento, ia bela provo, sed vivanta, palpebla realo. Per sistema klopodo (ankaŭ fare de ili) enkonduki ĝin en la internacian vivon, ĝi povus fariĝi tia realo ne nur por nia Asocio kaj la aliaj Esperanto-organizoj, sed ankaŭ por ĉiuj mondaj organizoj. Ni kredas, ke tio ne estus per si mem panaceo, sed ke la plialtiĝo de la nivelo de kompreniĝo kaj la samtempa reduktado de kostoj povus nur faciligi la internacian vivon, forigi la diskriminacion surbaze de lingvoj kaj porti pli proksimen la venkon de la modernaj problemoj kaj la kapton de la modernaj okazoj.“

Tuj post la inaŭguro estis malfermita foto-ekspozicio de UNESKO, kiun ĉeestis la ŝtatprezidanto de Islando, aliaj altranĝaj reprezentantoj de Islando kaj amasado kongresanoj. La klarigoj de la bildoj estis en Esperanto kaj islanda lingvo.

Dimanĉon postagmeze okazis la dua, „interna inaŭguro“ de la kongreso kun salutvortoj de la landaj reprezentantoj de E-organizaĵoj. En la nomo de BEA salutis k-do Nikola Aleksiev kaj invitis al amasa partopreno en la 63-a UK de Esperanto en Varna en 1978.

Festparoladon faris d-ro Tonkin. Li esprimis sian kontenton pro la ĉeesto de tiel eminentaj gastoj kaj pro la parolado de la ĝenerala direktoro de UNESKO. Ĉio ĉi indikas rekonon de tio, ke Esperanto estas afero serioza, inda kaj (eble plej grave)

garantiilo de kultura pluralismo en mondo, kie tiu pluralismo estas ĉiutage minacata“ kaj ke „egaleco inter la popoloj estas antaŭkondiĉo de efika kunlaboro“ — egaleco, kiun Esperanto celas atingi kaj iaŭsence simbolas.

Plue d-ro Tonkin emfazis, ke „sen forta kaj efika administrado ĉio estus perdita“, montrante per ekzemploj, kiujn paŝojn UEA faris kaj ankoraŭ devas fari por sekurigi la ĝisnunajn atingojn. . . kaj por veni al pliaj sukcesoj. La bilanco de UEA dum la lastaj du jaroj montris grandan profiton, kaj la asocia kapitalo kreskis je 75%. Respondante al iuj dubantoj pri la vivkapablo de la E-movado d-ro Tonkin diris, ke tiaj dubantoj eraras. „Esperanto ne estas ia leĝera ideo modigebla per nura optimismo. Ĝi estas lingvo kaj kulturo kaj nova mondkoncepto; ĝi malrapide enradikiĝas; ĝi lante kreskas. Ja optimismo estas foje virto, sed en la E-movado ĝi kelkfoje kreas en niaj mensoj esperojn nerealecajn kaj postajn seniluziigojn. Ni bezonas momente ne optimismon, sed realismon, ne belajn vortojn, sed saĝan, sisteman kaj efikan ekspluatadon de la monda situacio esence favora al nia afero.“

PRIDISKUTOJ DE LA ĈEFA KONGRESTEMO

La ĉefa kongrestemo estis „La rajto je komunikado“. Ĝin traktis pluraj kunvenoj, prelegoj, diskutgrupoj kaj publika podia diskutado.

La unuan referaĵon faris la sekretario de la UNESKO-komisiono en Islando A. Isakson, kiu speciale atentigis, ke en UNESKO la malgrandaj lingvoj ne ricevas sufiĉan atenton. Li ankaŭ esprimis la supozon, ke la ŝancoj de pli serioza priatento por Esperanto ĉe UNESKO kreskos.

La usona fakulo pri komunikado, prof. Sussman el Novjorko, diris, ke la ŝancoj de Esperanto estas des pli grandaj, ju pli komplikiĝas la monda lingvo-problemo. Li vidis ŝancojn por Esperanto, se la movado atentigas „la neŭtralecon de la organizaĵo kaj la kvaliton de la lingvo“. Esperanto, laŭ li, troviĝas je la flanko de protektantoj de demokrata kultura pluralismo. Prof. Sussman rekomendis, ke oni insistu ĉe internaciaj organizaĵoj pri esplorado de la demando uzi la lingvon Esperanto. Esperanto povus grave kontribui al la realigo de la Homaj Rajtoj.

Siajn vidpunktojn interŝanĝis ankaŭ prof. Kameŝkov (Soveta Unio), prof. Pool (Usono), d-ro Lins (FR Germanio), ankaŭ d-ro Blanke (GDR), Daŝgupto (Hinda Unio), S. Aalsteinsdottin (lektorino pri islanda lingvo kaj literaturo en la universitato de Rejkjaviko), Olafsson (lektoro pri antropologio)

kaj T. Broddason (lektoro pri sociologio).

Ses laborgrupoj traktis la komunikadon en la E-movado. Temoj estis la Esperanta radiofonio, la Esperanta gazetaro, la eldonado en Esperanto, la korespondado per Esperanto, la delegita reto de UEA kaj la komunikado interne de UEA.

Oni venis al jenaj konkludoj:

1. La rajto je komunikado estas en la kerno de la nuntempa problemaro de la mondo.

2. Por certigi, ke la ebleco estas je dispono al ĉiuj, individue kaj nacie, nepre necesas plene realigi la rajton je informado, proklamitan en la artikolo 19 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

3. Komunikado estas dudirekta procedo, kiu implikas la eblecon informi kaj informiĝi.

4. Inter la obstakloj al la apliko de la rajto je komunikado estas la lingvaj baroj, kies rilatoj kun la aliaj aspektoj de la problemo estas studendaj kaj esplorendaj.

5. Unu demando, kiu meritas studadon, estas: ĉu neŭtrala internacia helplingvo povas fari kontribuon al la solvo de tiu problemo, je la nivelo de la individuo, de asocioj kaj ŝtatoj kaj inter la nacioj.

6. Estas nepre necese konservi la integrecon de la kulturoj. La celo de la internacia lingvo ne estas anstataŭi aliajn lingvojn, sed funkcii kiel dua aŭ aldona lingvo por ĉiuj. Tiel ĝi helpas konservi lingvan pluralismon.

7. En la moderna mondo la realigo de la rajto je komunikado devas inkluzivi la eblecon aliri bazajn komunikilojn. Ĝi ne estas realigebla sen la kapablo legi kaj skribi en la gepatra lingvo. Por plena realigo persono devas havi la eblecon komuniki kun aliaj homoj ne nur en sia ŝtato, sed tra la tuta mondo. La plej bona protekto de la popoloj en landoj, kies lingvo estas parolata de nur malmulte da homoj, kontraŭ la superrego de pli grandaj lingvoj ŝajnas esti la plena posedo de sia gepatra lingvo kaj samtempe de internacia. Por tio la Internacia Lingvo Esperanto estus unike taŭga.

8. La evoluintaj landoj havas moralan devon helpi al la popoloj de la evoluantaj landoj pri la plibonigo de iliaj komunikiloj por komunikado interne de la koncernaj ŝtatoj kaj reciproke kun la ekstera mondo.

9. Meritas studadon la utileco de la Internacia Lingvo ĉe la evoluantaj landoj kiel komunikilo, kiu povus konservi la lingvan pluralismon. Tia studado devus ampleksi la facilecon de lernado de artefarita lingvo kaj ĝian neŭtralecon, inter aliaj faktoroj.

10. La popoloj en siaj interŝtataj rilatoj nepre devas povi kunlabori en Unuiĝintaj Nacioj, UNESKO kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kun plena egaleco kaj digno, por la solvo de la gravaj problemoj, poli-

tikaj, ekonomiaj kaj sociaj, kiuj alfrontas la mondon.

11. UNESKO kaj ankaŭ UN devas esplori novajn procedurojn, inkluzive la eblecon utiligi la Internacian Lingvon, por dokumentado kaj interpretado, por ebligi la plenan realigon de la rajto je komunikado oficiala inter la ŝtatoj-membroj sen lingva diskriminacio.

LA SOLENA FERMO DE LA KONGRESO

Sabaton, la 6-an de aŭgusto 1977, preskaŭ mil kongresanoj kolektiĝis por la ferma kunveno de la kongreso. Komence d-ro Tonkin prezentis la novelektitan Estraron de UEA. La estraranoj estas: prezidanto d-ro H. Tonkin (eksteraj rilatoj, financa programo), vicprezidantoj prof. C. Stop-Bowitz (faka agado kaj delegita reto) kaj mag. W. Auld (kulturo kaj informado), ĝenerala sekretario d-ro W. Bormann (planado); membroj s-ino U. Grattapaglia (landa kaj regiona agado), s-ro Maertens (financoj, administrado kaj specialaj taskoj), s-ro A. Pettyn (edukado), d-rino F. Szabó-Felső (kongresoj kaj turismo).

Rilate al la estonta agado de UEA d-ro Tonkin elstarigis tri kampojn:

1. La vizito de la ĝenerala direktoro de UNESKO memorigas nin pri tio, ke ni estas ne nur eŭropa movado. De nun ni impete antaŭeniru en la direkto al tutmondigo de Esperanto.

2. Dum la lastaj du-tri jaroj plifortiĝis la rilatoj inter ILEI kaj UEA. Ili ambaŭ devos pli proksime kunlabori sur la kampo de edukado. La kontribuo de UEA estas, unuavice, helpi pri la produktado de lerniloj en lingvoj, en kiuj tiaj ĝis nun ne ekzistas, kaj antaŭenigi la neformalan lernadon de Esperanto, ĉar eble la plimulto de la esperantistoj lernis la lingvon ekster lernejoj kaj kursoj.

3. Atendas nin gravaj taskoj sur la kampo de eksteraj rilatoj. „Tiu ĉi kongreso povus esti decida kongreso en la historio de la E-movado“ ne pro la vizito de s-ro M'Bow kiel tia, sed ĉar tiu evento havas katalizan karakteron, povante inspiri nin al nova kuraĝo. D-ro Tonkin nomis la viziton „defio por ni“. La parolado de s-ro M'Bow distribuiĝos tra UNESKO, ĝiaj naciaj komisionoj kaj multaj kunlaborantaj institucioj. Ĝi sendube vekos scivolon pri Esperanto, kaj ni devos bone prepari nin por saĝa respondo al tiu scivolo. Pro tio UEA lanĉos kampanjon por informadi UNESKO-n kaj ĉiujn internaciajn organizaĵojn pri la monda lingvo-problemo kaj pri Esperanto. Tio ne estas facila laboro precipe pro niaj konstantaj financaj zorgoj. Tial la prezidanto petis specialajn monkontribuojn por antaŭenigi la laboron de UEA ĉe UNESKO, anon-



cante, ke li mem donacas 250 guldenojn por tiu celo.

Daŭrigante sian paroladon d-ro Tonkin atentigis, ke la movado spertas progresojn kaj malprogresojn. Li proponis, ke ni atingu stabilecon sur la kampoj, sur kiuj ni malprogresas, kaj plian progreson sur tiuj, sur kiuj ni progresas. La eblecoj estas antaŭ ni, la lingva problemo daŭre pliakriĝas, sed ni ne povas atendi, ke la historia fluo alportos la sukceson de Esperanto. „Estas ni, kiuj alportos la sukceson de Esperanto, per niaj rimedoj, per nia energio, per niaj ideoj.“ La prezidanto apelaciis al la kongresanoj pensi pri sia eblo kontribui al la estonta agado de UEA. „Venis la historia momento kaj ni devas ĝin kapti!“

D-ro Werner Bormann, la nova ĝenerala sekretario de UEA, faris superrigardon de la kongresa laboro, donante gravan atenton al la traktado de la kongresa temo „La rajto je komunikado“.

Parolante pri la laboro de la dua ĝenerala kunveno de UEA, kiu diskutis la estraran raporton kaj sub la prezido de prof. Stop-Bowitz inkluzivis podian diskuton pri la temo „UEA sin preparas por la estonteco“, d-ro Bormann notis, ke ankaŭ tiu kunveno starigas gravajn demandojn: Ĉu ni havas sufiĉe da instruistoj? Ĉu ni estas preparitaj por antaŭenigo de Esperanto en la Tria Mondo? Ĉu entute la Movado kapablas fronti la problemojn de la estonteco?

Resumante d-ro Bormann diris, ke la Movado ricevis fortan kuraĝigon, ankaŭ valorajn konsilojn de esksteruloj dum tiu ĉi kongreso. Restas nia tasko gardi la neŭtralecon de la asocio, priatenti la kvaliton de la lingvo kaj ankoraŭ pli bone organize prepari nin por la estonteco.

Prezentante la kongresan rezolucion d-ro Tonkin diris, ke ĝi esence havas internan

karakteron, sed ke sekvos serio de dokumentoj pri la rezultoj de la kongreso, precipe pri ĝia temo „La rajto je komunikado“.

Post la sciigoj pri la rezultoj en la belartaj konkursoj fare de s-ro B. Ragnarsson, d-ro Tonkin prezentis la novajn membrojn de la Honora Patrona Komitato de UEA: prof. Vasil Peevski (Bulgario) kaj prof. Fujio Egami (Japanio).

La trofeo Fyne, kiu ĉiun duan jaron estas aljuĝata de UEA al la plej aktiva landa asocio, iris ĉi-jare al la japana E-movado. D-ro W. Bormann legis la motivigon de la aljuĝo.

Sekvis dankoj al LKK, al la islandaj aŭtoritatoj kaj al ĉiuj, kiuj en diversaj aranĝoj grave kontribuis por la sukcesa kongreslaboro.

Fine — la tradicia transdono de la kongresa flago. Ĝin transprenis la prezidanto de LKK en Bulgario Nikola Aleksiev, kiu voĉlegis bonvenigan mesaĝon de s-ro P. Mladenov, la bulgara ministro pri eskteraj aferoj.

En siaj finaj vortoj d-ro Tonkin levis la demandon, kiun epiteton doni al la kongreso. Lian rimarkon, ke ĝi estis la „meteorologie eksterordinara“ kongreso (fakte regis ekstrema bona vetero dum la tuta kongres-tempo) la kongresanoj kvitancis per rido kaj aplaŭdo. D-ro Tonkin daŭrigis, ke li ne volas nomi la kongreson epokfara, ĉar tia ĝi estos nur se ni laboros efektive. „Ni nomu ĝin „la defia kongreso“, proponis li. Ĝi alportis aŭtoritatajn rekonon al nia agado, sed antaŭ ni nun troviĝas multe da laboro. „Ni prenu per ambaŭ manoj tiun defion!“

Fermante la kongreson d-ro Tonkin vokis: „Ĝis revido en Varna!“

Sonis solene „La Espero“, kantata entuziasme de ĉiuj kongresanoj.

DEKLARO DE MEM

La kunvenintaj kongresanoj el diversaj landoj post enkonduka parolado de la prezidanto de MEM pri la realigo de la Helsinkia Fina Akto kaj post la okazintaj debatoj

deklaras:

1. La Fina Akto, aprobita de la gvidantoj de 33 eŭropaj landoj, Usono kaj Kanado en Helsinki 1975, havas grandan signifon por la evoluado de la interrilatoj de ŝtatoj kun malsamaj sociaj sistemoj surbaze de paca kunekzistado, reciproka sekureco kaj

aktiva kunlaborado. Ĝia signifo ne limiĝas nur por la Eŭropa kontinento, sed valoras por la tuta mondo.

2. Por la normala evoluo de la Esperanto-movado enlande kaj internacie estas tre necesa malstreĉeco en la internaciaj rilatoj kaj forigo de la militminaco.

3. La esperantistaro subtenas la pluan realigon de la principoj entreprenitaj en la Fina Akto de la Tuteŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro en Helsinki (1975) en ties tri

fundamentaj fakoj — politika, ekonomia kaj kultura, ĉar ili estas tre intime kaj nedisigeble ligitaj.

4. Tiurilate plej grava tasko estas la ĉesigo de la vetarmado kaj la sistema malgrandigo kaj poste likvido de la stoko de armiloj, precipe de amasmortigiloj.

5. La esperantistoj devas subteni la protestan kampanjon de la Monda Packonsilio kontraŭ la produktado de t. n. „neŭtrona bombo“, kiu estas hipokrite reklamata kiel humana armilo, ĉar ĝi estos mortiganta nur la homojn, konservante la konstruaĵojn.

La 2-an de aŭgusto 1977

6. La esperantistaro devas subteni la kunvokon de speciala sesio de la Uniĝintaj Nacioj por malarmado kaj ĉiujn klopodojn por fakta kaj reala transformiĝo de la internacia malstreĉeco en daŭran universalan fenomenon, por ke neniam la mondo revenu al la periodo de „malvarma milito“.

La kunvenintoj esperas, ke la politika realismo venkos en la interŝtataj rilatoj, ĉar la malstreĉeco estas absolute necesa por la progreso, kulturo kaj paco en la interesoj de la tuta homaro.

Por la kunvenintoj : *Imre Kutas*,
prezidanto de la kunveno

225-JARIĜO DE SALAVAT JULAEV

La 2—3-an de julio la Salavata E-Klubo celebris 225-jariĝon de la baŝkira nacia heroo Salavat Juliaev, kiu kune kun Emelijan Pugačov militis por liberigo de la popolo, suferanta pro la ekspluatado fare de la feŭduloj.

En la renkontiĝo ĉeestis gastoj el urboj Ufa, Sterlintamak kaj Iŝimbaj. La prezidantino R. J. Kutlubaeva salutis la partoprenantojn. Sekvis prelego pri la vivo kaj batalo de Salavat Juliaev.

KONCIZE

● En 1980 la Pola Nacia Banko eldonos moneron kun portreto de d-ro Zamenhof je valoro de 100 zlotoj.

● Sekve de anonceto en la revuo „Esperanto“ la societo „Savu la Infanojn“ en urbo Tibro ricevis 556 desegnaĵojn de infanoj el 20 diversaj landoj. Ne nur la societo en Tibro, sed ankaŭ la sveda asocio de tiaj societoj estis pli ol surprizita pro la praktika valoro de Esperanto.

● En Istambul Esperanto-kurso arigas 70 interesulojn.

● En la universitato de Teheran la 25-an de majo komenciĝis jam la 9-a E-kurso. Ĝis nun pli ol 2000 (!) gestudentoj aliĝis al tiuj ĉiusemajnaj kursoj. La 10-a kurso komenciĝos en septembro.

● Komence de majo d-ro Jozefo Megyeri, kiu laboras en hospitalo en Aden, faris ĉe la Medicina Fakto de la Adena Universitato prelegon pri „Eblecoj kaj utileco de internacia lingvo en la medicinaj sciencoj“. La gene-

K-do Boris Kolker — komitatano de UEA, prelegis pri la historio de la E-movado en Rusio. La gastoj trarigardis la ekspozicion de la pentristo M. Kartašov, dediĉitan al la vivo kaj agado de Salavat Juliaev, kaj vizitis koncerton de la baŝkira ensemblo de la kanto kaj danco „Agidelj“.

La sekvan tagon la gastoj boatpromenadis tra la rivero Belaja, kantis, fotis kaj ludis.

Viktor Vjazovcev

rala interesiĝo estis granda: jam antaŭe kelkaj studentoj komencis lerni Esperanton.

● Du virinoj transprenis en majo prezidantajn funkciojn: Elsbeth Bormann fariĝis la 10-a prezidanto de la Germana E-Asocio (GFR), kaj Akiko Woessink-Nagata nun prezidas la organizacion de nederlandaj esperantistoj.

● Josip Broz Tito, prelegante komence de marto ĉi-jare en sia naskiĝloko Kumrovec, menciis, ke li siatempe en malliberejo i. a. serioze studis lingvojn, „unue Esperanton kaj poste aliajn“.

● TUCEG, la Sindikata kaj Koopera E-Grupo, fondita en januaro 1977 en Britlando, jam sukcesis gajni personan subtenon de multaj altrangaj gvidantoj de la brita laborista movado. Ĉi tiu nova poresperanta organizo fakte estas parto de la laborista movado, konsistanta el aliĝintaj individuoj kaj organizoj en tiu movado. La Honora Prezidanto de TUCEG estas Jack Jones, ĉefsekretario de la Sindikato de Transportaj kaj Generalaj Laboristoj (TGWU), la plej granda sindikato en la lando. En letero petante organizojn sindikatajn kaj kooperajn aliĝi al TUCEG, li diris: „Mia multjara sperto en la sindikata kaj laborista movado kon-



vinkis min, ke Esperanto povas fari fortan kontribuon al la solvo de la monda lingvo-problemo“.

La prezidanto de TUCEG, Stan Newens, estas parlamentano de la Labor-Partio kaj prezidanto de la Londona Koopera Societo. Dum la inaŭgura kunveno li nomis Esperanton „la plej utila el ĉiuj lingvoj“.

La unuan de majo ĉe la londona laboristara manifestacio estis disdonitaj la unuaj ekzempleroj de 100 000 flugfolioj, eldonitaj de TUCEG. En ili oni pritraktas la lingvan problemon kaj Esperanton el la vidpunkto

de internaciismo, ne nur kiel praktikan problemon, bezonantan racian solvon, sed ankaŭ kiel politikan problemon, kiu postulas demokratian, senkoloniigan solvon. Jen teksto-parto: „El la 3000 aŭ pli da lingvoj en la mondo nur tiuj de la ĉefaj potencoj estas uzataj internacie. Ĉi tio estas maldemokrata, nefika kaj multekosta. Laboristoj malpli ol aliaj povas elspezi la tempon, monon kaj vojaĝadon necesajn por mastri eĉ unu fremdan lingvon, por ne paroli pri multaj.“

El „Informilo de Internacia E-Muzeo“, 3/1977

NI RECENZAS

„EN LA VICOJ DE LA KLASO“

La libro „En la vicoj de la klaso“, kiun la sindikata libroeldonejo „Profizdat“ prezentis al la bulgaraj legantoj antaŭ nelonge, estas kolekto de artikoloj, dokumentaj skizoj kaj rememoroj de nia konata ĵurnalisto, aganto de la revolucia sindikata movado kaj arda esperantisto Nikola Aleksiev.

Kiel ĵurnalisto kaj sindikata aganto Aleksiev komencis aktivan agadon en la fino de la 20-aj jaroj. Jam studento li redaktis ĵ. „Studenta Tribuno“. Poste li fariĝis redaktoro de ĵ. „Edinstvo“ (Unueco) — organo de la sendependaj Laboristaj Sindikataj Unuiĝoj (NRFS — 1920-1934 j.).

Post la popola venko super la faŝismo Aleksiev estis fondinto kaj redaktoro de ĵ. „Zname na Truda“ (Standardo de l' Laboro — 1944-45) kaj unu el la fondintoj kaj ĉefredaktoro de ĵ. „Trud“ (Laboro — 1946-1952) — organo de la Centra Konsilio de Bulgaraj Profesiaj Unuiĝoj.

Kiel esperantisto Aleksiev eklaboris en la E-gazetaro tre frue. Jam en 1929 j. li redaktis ĵ. „Balkana Laboristo“, precipe esperantlingve, kiu ekde la sekva jaro fariĝis organo de la ĵusfondita Bulgara Laborista E-Asocio (BuLEA). Sekretario de BuLEA fariĝis Aleksiev. Li redaktis ankaŭ la ilustritan dusemajnan bulgarlingvan ĵ. „Mejdunaroden Ezik“ (Internacia Lingvo — 1930-31), kiu faris grandan propagandon de Esperanto, kaj tuj poste — ĵ. „Mejdunaroden Rabsekor“ (Internacia Laborist-Kampana Korespondanto — 1932-1934 j.).

La libro „En la vicoj de la klaso“ enhavas kvar fakojn. En la unua estas artikoloj pri la granda kontribuo de D. Blagoev kaj G. Dimitrov por kreo kaj konstruo de forta revolucia sindikata movado en Bulgario.

La dua fako enhavas mallongajn skizojn pri elstaraj agantoj de la bulgara revolucia sindikata movado, kun kiuj Aleksiev senpere laboris: Asen Bojaĝiev, Sâbi Dimitrov, Naĉo Ivanov, Nikola Sopov, Angel Ivanov. En la tria fako estas artikoloj, dediĉitaj

al la revolucia sindikata gazetaro en nia lando, kaj en la kvara fako — rememoroj de Aleksiev el lia riĉa revolucia agado kaj batalo, pro kiu li suferis sep jarojn en la faŝistaj malliberejoj. Ĉiu ĉi materialo estas tre interesa kaj utila por ĉiuj legantoj. Ĝi instruas kaj inspiras.

Kun duobla intereso la bulgaraj esperantistoj legas tiujn paĝojn de la libro, en kiuj temas pri agoj kaj agantoj de la bulgara E-movado. Jam en la enkonduko, farita de la elstara bulgara verkisto akad. Georgi Karaslavov — sincera amiko de Esperanto, la aŭtoro de la libro estas nomita „amasulo“, kapabla gajni adeptojn, kiun oni sendis al plej diversaj sektoroj: studentaj bataloj, Esperanto-societoj, sindikata movado, kontraŭmilitaj arangoj... „Ĉiam kaj ĉie li estis kapabla plenumi la konfidentajn taskojn“. Ĉe la priskribo de lia riĉa ĵurnalista agado G. Karaslavov aparte substrekas ankaŭ lian laboron kiel redaktoro de E-periodaĵoj.

Kun granda intereso la esperantistoj legas la artikolon „Jurnalo „Mejdunaroden Rabsekor“ (Internacia Laborist-Kampana Korespondanto) — ilustrita, kolora, dusemajna ĵurnalo, kiu dum kelkaj jaroj estis prestribuno de tiuj laboristoj kaj vilaĝanoj ĉe ni, kiuj per la helpo de la internacia lingvo Esp-o organizis vastan internacian korespond-movadon“. En tiu ĵurnalo oni publikigadis abundan materialon pri la nova vivo kaj pri la socialisma konstruado en la unua en la mondo ŝtato de laboristoj kaj kampanoj — USSR, samkiel pri la vivo kaj bataloj de la laboristaro en la tuta mondo por libero kaj socia justeco — kontraŭ la faŝismo kaj la milito. Aparte emocias la paĝoj el la fako „Neforgeseblaj nomoj“, dediĉitaj al la bonegaj laboristaj agantoj-esperantistoj Nikola Sopov kaj Angel Ivanov (Angelo). La unua, N. Sopov, ordinara laboristo, atinginta la

(Sekvas sur p. 16)



ĈU TEĤNIKUMO? ĈU KOMBINUMO?

En la bulgaraj E-eldonaĵoj kaj en la konversacioj de la bulgaraj esperantistoj oni ofte renkontas la vortojn „teĥnikumo“ kaj „kombinumo“. Ĉu ili estas korektaj? Ni esploru aparte ilin.

En la bulgaran lingvon la vorto „teĥnikum“ venis el la rusa. Do ĝi ekzistas en du lingvoj kaj ĉar la radiko „teĥnik“ estas internacia, multaj bulgaroj konsideras ebla enkonduki ĝin en Esperanton. Sed kial kun la sufikso „um“ kaj ne kun „ej“? Ĉu la rilato de la radiko al la objekto estas nedifinita, por havi rajton uzi „um“? Evidente ne!

Kion signifas la uzata en la bulgara lingvo „teĥnikum“? En la granda Bulgara-Esperanta Vortaro ĉe tiu vorto ni legas: „teĥnikumo (meza teknika lernejo)“. Mi tuj rimarkigu, ke nur en tiu ĉi vortaro ekzistas en Esperanto tiu vorto. Sed ĉu estas vero, ke ĝi estas „meza teknika lernejo“? Certe ne. Per tiu ĉi vorto oni signas diversspecajn faklernejojn: vilaĝmastrumajn, ekonomiajn, medicinajn, pentroartajn, diversajn metiajn lernejojn kaj eĉ baletajn, muzikajn ktp. En tiu senco estas klarigita la vorto en la Bulgara Klariga Vortaro. Se en nia lingvo ĝi havas tiom larĝan signifon, estas klare, ke ekzistas danĝero erarigi la esksterlandan esperantiston. Li nepre pensus, ke tio estas lernejo pri iu tekniko. Ekzemple, se ni dirus „medicina teĥnikumo“, li pensus, ke temas pri lernejo pri medicina instrumentaro. Fakte tiu nocio en la bulgara lingvo signifas lernejon por mezgradaj medicinistoj. Do ni vidas, ke ne ĉiam temas pri teknika lernejo. Jen kial la bona E-traduko de tiu ĉi vorto (kaj eble la nura) estas: faklernejo. Se ĝi estas akompanata de epiteto, kiu klarigas la fakon, en tia okazo la klariga kunmetaĵo „fak“ estiĝas superflua

Do ne estas necese diri „vilaĝmastruma faklernejo“, sed simple „vilaĝmastruma lernejo“, samkiel „teknika lernejo“, „lernejo pri tabakproduktado“, „medicina mezlernejo“, „lernejo de artmetioj“ ktp.

La deveno de la vorto „kombinat“ en la bulgara lingvo estas la sama (el la rusa). Ankaŭ tie ĉi la sufikso „um“ estas nekonvena. Kion signifas „kombinat“? — Fabriko (aŭ fabrikaro), kiu produktas plurajn objektojn de sama kruda materialo. Sed ŝajnas al mi, ke preskaŭ ne ekzistas industria entrepreno, kiu havas ununuran produkton.

Bedaŭrinde, tiu ĉi vorto enŝteliĝis eksterleĝe en kelkajn E-vortarojn (bulgarajn kaj rusajn). Ĝi trovis lokon eĉ en Plena Ilustrita Vortaro. Sed kiel ĝi estas klarigita tie? Ni legu sur paĝo 531: „kombinumo = kombinato. En Sovetunio — ekonomika unuo, kuniganta sur unu sama teritorio la entreprenojn de unu aŭ pluraj industriaj fakoj, kies agadoj estas solidaraj: elektrokemia kombinato.“

La klarigo estas iom stranga. Ĉu en la internacia lingvo iu ajn objekto en iu ajn lando povas havi unu E-nomon, kaj en alia lando alian nomon?! Evidente tie ĉi la aŭtoroj de la vortaro deziris emfazi, ke tiu vorto estiĝis termino en la koncerna lando (Sovetunio). Sed tiun terminon ni neniam renkontas en la E-literaturo de okcidenta Eŭropo aŭ de aliaj kontinentoj. Kaj ja tie ankaŭ ekzistas similaj entreprenoj. Pro tio ni uzu la fundamentajn vortojn „fabriko“, „fabrikaro“, „industria entrepreno“ aŭ se oni nepre dezirus substreki la plurajn produktojn, pli bone oni uzu „kombinato“ ol la nekonvena, neuzata, neklara kaj nekomprenebla por la grandega parto de la monda esperantistaro „kombinumo“.

V. Oljanov

SONA GAZETO

La Estraro de UEA lastatempe en kelkaj siaj kunsidoj pridiskutis la demandon pri altigo de la lingva nivelo de la membraro. En tiu kunligo leviĝis antaŭ nelonge interesa propono. Temas pri tio, ke UEA klopodu produkti sonbendan gazeton, kiu enhavu interesajn informojn de karaktero amuza, instrua kaj modela. Ĝi do kaptu la intereson de siaj ricevantoj, helpu ilin en la E-agado kaj liveru al ili modelan elparolon de Esperanto. La gazeto estus abonebla laŭ la maniero kutima ĉe presitaj gazetoj kaj ĝi verŝajne estus ideala por lokaj grupoj, kursoj ktp. Ĝi ankaŭ estus libere kopiebla kaj sekve utiligebla speciale en tiuj landoj, kiuj havas transpagajn malfacilaĵojn.

(el p. 15)

postenon de sekretario de la Bulgara Laborista E-Asocio, estis pendumita de la faksistoj je la 15 de novembro 1941 pro aktiva partopreno en la kontraŭfaŝismaj batalgrupoj. La dua, Anĝelo, post kruelaj turmentadoj en la polico mortis en la cementaj ĉeloj de la Centra Sofia Malliberejo en junio 1941.

Ni varme rekomendas al ĉiuj la libron „En la vicoj de la klaso“.

K. Válev

Samideano,

Ĉu vi partoprenas aktive en la abonkampanjo de «Bulgara Esperantisto» por 1978? Abonu! Abonigu! Agu energie kaj senprokraste! Okupu indan lokon sur nia honora Verda Tabulo!



Verdaj stebetoj

Ljudmila Jevsejeva

PLUMZIGZAGOJ

Ripozon postlaboran mi dediĉas
al libroj, donacitaj de amikoj,
al la kontakto kun presita vorto,
konversacioj viglaj, polemikoj.

Sur ĉiu paĝo libra min alfrontas
tergloba pulso kaj temperamento,
flug-salto kosmon, paŝoj sur la luno
de la homara sciavida gento.

Montar' impresas min kaj stepoj vastaj,
bru' akvofala, laga mildparolo,
planeda kur', pom' ruĝa kiel flamo,
en verda hararang' betulo kaj tremolo.

Mi vidas en ĝangal' lianojn pendi.
Min plezurigas nordpolusa limo.
Benataj estu vi, amikoj miaj,
kaj la zigzagoj revaj de la plumo!

KURAĜULINO

Timas mi nenion!
Ĉu vi kredas tion?

Frapu hajlo sur tegmento
aŭ fenestron batu pluv' . . .
Ja ne temas pri karono,
ja ne temas pri diluv'
Kiu vidis min tremanta
en mallum', ĝis noktofin'?

Certe, vi kondukis same,
se . . . apudas panjo vin.

TRA LA GAZETARO

J. «Kubratski Zov» — Kubrat (10. II. 1977): informo „Ĝojiga jubileo“ — pri la celebros de la loka E-societo „Progreso“.

J. «Novo Ludogorie» — Razgrad (15. II): grandspaca artikolo de Ĥristo Dimitrov „20 jarojn esperantista societo“ — pri la jubileo de E-societo „Progreso“ en u. Kubrat.

En j. «Septemvrijska Pobeda» — Pleven (24. II): artikolo de Venecij Georgiev pri la Semajno de Internacia Amikeco.

En la sama ĵurnalo (5. IV): informo pri la jarkunveno de E-societo „Eterna Amikeco“ en u. Pleven.

J. «Oteĉestven Front» — Sofio (18. III): sub titolo „Unu matenon ĉe la verkisto“ intervjuo de Emilia Ĝarneva kun la verkisto-esperantisto Pelin Velkov.

J. «Vitoŝa» — uzino „Vitoŝa“, Sofio (19. III): informo de Petro Popnikolov pri partopreno de uzinaj esperantistoj en E-aranĝo en Slovakio.

J. «Oteĉestven Zov» — Vraca (1. IV): sub slogano „Esperanto — lingvo de la paco“ sur preskaŭ tuta paĝo aperis du artikoloj — „15-jaroj de E-societo „Verda Raketo“ de Bojĉo Mladenov kaj „Nia Klubo“ de Kiril Velkov, sekretario de Klubo „Esperanto“ ĉe la Distrikta Junulara Domo. La paĝo estas aranĝita okaze de la Tria Nacia Renkontiĝo de Lernantoj-Esperantistoj en Vraca.

J. «Kom» — Berkovica (1. IV): informo de Svetla Stefanova pri la jarkunveno de E-societo „Verda Stelo“ en la urbo.

J. «Narodna Mladeŝ» — Sofio (2. IV): sub titolo „Renkontiĝo de junaj esperantistoj“ informo de la propra korespondanto de la ĵurnalo Dimitro Boĉev pri la sama konferenco, kiu partoprenis 248 gelernantoj kaj gastoj el Sovetunio, Jugoslavio, Finnlando kaj Bulgario.

Pri la sama konferenco informis ankaŭ J. «Rabotniĉesko Delo» — Sofio (3. IV).

J. «Naroden Drugar» — Jambol (7. IV): informo de M. Kaĉuleva pri la jarkunveno de E-societo „M. Gorkij“ en la urbo.

J. «Ŝumenska Zarja» — u. Ŝumen (7. IV): informo de Jivko Jendov pri la jarkunveno de E-societo „Suno“ en u. Vârbica.

En la sama ĵurnalo (9. IV): informo de Cvjatkoto Todorov pri la jarkunveno de E-societo „Vekiĝo“ en Ŝumen.

J. «Zarja na Komunizma» — Loveĉ (12. IV): informo de Ilija Ivanov pri la agado de la esperantistoj en Loveĉ dum 1976 j.

En j. «Dunavska Pravda» — u. Ruse (14. IV): artikolo „La kreinto de Esperanto“ de Stefan Popov okaze de 60 jaroj de la forpaso de d-ro L. L. Zamenhof.

En j. «Avtotransport» — uzino „Madara“ en Ŝumen (19. IV): detala informo de Cv. To-

GRAVA POR LA E-JUNULARO!

Je la 19—20 de novembro en Veliko Târnovo okazos renkontiĝo de la Esperanto-junularo el Norda Bulgario. La programo:

1. Je la 19-a vespere: junulara renkontiĝo kun amuzoj kaj belarta programo.

2. Je la 20-a: Prelego je temo »Mi, mia loĝloko kaj la kongreso«. Por fruktodone partopreni la diskutadon pri tiu ĉi temo, ĉiu junulo preparu sin pri la jenaj punktoj:

a. Mia loĝloko; b. Ĉu mi partoprenos la kongreson de TEJO en Veliko Târnovo; c. Ĉu mi estas preta por la kongreso.

3. Ekskurso al la lokoj de TEJO-kongreso.

Junaj esperantistoj, preparu vin bone pri la temo de la renkontiĝo kaj amase partoprenu ĝin!

dorov pri la jarkunveno de la uzina E-societo „Progreso“.

En ĵ. »Gâlâbovska Iskra« — u. Gâlâbovo (22. IV): sub titolo „Sindone“ granda skizo de Marija Balikova pri Kanjo Kanev, prezidanto de la loka E-societo „Kolombo de la Paco“.

En ĵ. «Narodno Delo» — Varna (3. V): informo pri la vizitoj ĉe urbaj oficialaj instancoj fare de d-ro V. Sadler, direktoro de CO de UEA, la Konstanta Kongresa Sekretario Ch. Power kaj N. Aleksiev, prezidanto de LKK de 63-a UK de Esperanto.

En ĵ. «Karlovska Tribuna» — Karlovo (7. V): informo de ing. Bojidar Leonov pri la varia agado de la loka E-societo „Vasil Levski“.

En la semajna ĵ. «Srednoŝkolsko Zname» — Sofio (24. V): artikolo „Esperanto kaj la ŝako“ de Ivan Vojnov.

En la sama ĵurnalo (21. VIII): intervjuo de Milena Dimitrova kun Meĉodi Panĉev pri la agado de la Sekcio de Kolektantoj ĉe BEA.

Ĵ. «Borba» — Veliko Târnovo (12. V): informo de Nikola Najdenov pri la subskribita kontrakto pri kunlaboro inter la esperantistoj de la ĝemeligitaj urboj V. Târnovo kaj Poltava (USSR).

Ĵ. «Septemvrijsko Zname» — Pazarĝik (25. VI): informo de Konst. Genĉev pri E-kunveno, en kiu Ivan Ŝivarov prelegis pri Zamenhof kiel poeto kaj tradukanto. La kunvenon ĉeestis eksterlandaj esp-istoj.

En ĵ. «Oteĉestven Front» — Sofio (22. VII): informo sub titolo „Gastoj el 50 landoj por la Universala Kongreso de Esperanto“ — pri la preparlaboroj por la 63-a UK en Varna.

En la sama ĵurnalo (2. VIII.): artikolo „Esperanto — lingvo de paco kaj interkompreno“ de Draguŝko Petrov (pri la agado de IPTEA).

En ĵ. «Borba» — Veliko Târnovo (2. VIII): informo de Penka Ĝarbuŝanova pri la preparata ekspozicio en u. Poŝki Trâmbeŝ sub titolo „La mondo sub la signo de Oktobro 17“ — per materialoj el la tuta mondo, liveritaj pere de Esperanto.

En la sama ĵurnalo (16. VIII): artikolo „70 jaroj de Bulgara Esperantista Asocio“ de Nikola Najdenov, prezidanto de la loka E-societo „Lumo“.

En ĵ. «Zarja na Komunizma» — u. Loveĉ (2. VIII): ampleksa raporto de Pejo Dulev pri la Mezlernejana Esperantista Arkeologia Laborbrigado en v. Debnevo, distrikto de Loveĉ.

En ĵ. «Septemvrijsko Slovo» — u. Miĥajlovgrad (2. VIII): intervjuo kun la konata politika aktivulino Vera Naĉeva sub titolo „Vivo, dediĉita al la partio“; oni mencias ankaŭ ŝian esperantistan agadon.

En la sama numero: Recenzo pri la nova libro de Nikola Aleksiev „En la vicoj de la klaso“. Oni mencias detale la esperantistan agadon de la aŭtoro.

En ĵ. «Naroden Drugar» — u. Jambol (4. VIII): rubriko „Esperanto — fenestro al la mondo“ enhavanta la artikolon de Konstantin Kavarĝikov „La utilo de la Internacia Lingvo“ kaj 5 informojn pri la agado de la lokaj esperantistoj.

En la sama ĵurnalo (23. VIII): informo pri renkontiĝo de la esperantistoj de Jambol kun pola esperantisto.

DEZIRAS KORESPONDI

Bulgario

Ivan Todorov — kom. Vâzraĵdane, bl. „Kumanovo“, vĥod 4, Ruse (37-jara el. teknikisto — pm, moneroj)

Ilka Marinova — kvart. Goznica, Loveĉ (16-jara lernantino — kun ĉl)

Ceca Bodurova — ul. Karpaĉev 66, Loveĉ (24-jara — kun ĉl)

Veska Nikolova — selo Aleksandrovo, Loveŝko (22-jara fraŭlino — kun ĉl)

Stojan Ŝejretov — kv. Storgozia bl.6, I etaĝo, Pleven (jurkonsilisto — kun ĉl)

Simeon Nikolov — str. Petâr Vaskov 55, 4000 Plovdiv (41-jara).

Dimitro Burdev — ul. d-r N. Kovaĉev 7, 4000 Plovdiv (30-jara — kun ĉl pri ĉt, precipe sporto, turismo, foto, pop-muziko, revuo).

Ivan R. Saldiĉev — str. Ravniŝta 17, 4000 Plovdiv (35-jara).

Georgi S. Stojnov — str. Iztoĉna Rumelia 6, 4000 Plovdiv (40-jara abe'isto).

Maria Kjuĉukova — bul. V. Kuĵbiŝev 55, 4000 Plovdiv (35-jara).

Todorka Veleva — str. 3 mart 23, 4000 Plovdiv (29-jara).

Zorka Nenova — str. Petâr Vaskov 53, 4000 Plovdiv (32-jara).

Maria Terzijska — bul. Kar Marks 49—IV, 4000 Plovdiv.

Maria Ĉokalieva — str. Han Kardam 3, 4000 Plovdiv.

Svedio

S-ino Elly Lundmark — Dalavägen 12, 702 17 Örebro

Isidor Lundmark — Delavägen 12, 702—17, Örebro

Alice Kruse — Engelbrektsgatan 62 E, 702—13, Örebro

John Sunvisson, Restalunsvägen 73, 702—16, Örebro

Gustaf Loman — Runvingegatan 25, S — 703—65, Örebro